juna amiko

INTERNACIA KVARONJARA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

ilei

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

92/4

NUMERO 63

Komparo de karakteroj de l'homo kun la nomoj de bestoj

(kolektis kaj elpersigis: Ĝavad Kamali, Maŝhado, Irano).

aktiva kiel formiko
algluiĝema kiel iksodo
altkreska kiel ĝirafo
ambaŭseksa kiel leporo
avida kiel formiko
babilema kiel papago
bela kiel gazelo
belvoĉa kiel najtingalo
blekema kiel lupo
brava kiel leono
ĉarma kiel cervino
elsuĉema kiel hirudo
eltenema kiel lupo
febla kiel pasero
fiera kiel pavo
glutema kiel bovo
grandkorpa kiel kamelo
harkovrita kiel urso
ĵaluza kiel tigro
kaduka kiel hieno
koketa kiel pavo
kolerema kiel rabia hundo
korpulenta kiel elefanto
kuraĝa kiel baleno
magra kiel araneo
malbela kiel simio
malbonhumora kiel hundo
malfidela kiel kukolo
malica kiel vipuro
malĝentila kiel porko
malpura kiel hundaĉo
malpurema kiel porko
milda kiel ŝafidomuta kiel fiŝo
neatenta kiel mulino
neinteligenta kiel bovo
nigrahara kiel korvo
nigrahaŭta kiel skarabo
obstina kiel mulo
orgojla kiel leopardo
pala kiel ter-vermo
pereiga kiel strigo
pigra kiel hipopotamo
pikparolema kiel skorpio
rankora kiel kamelo
rapidirema kiel perdriko
ruza kiel vulpo
saĝa kiel upupo
saltadanta kiel akrido
senbarba kiel ŝarko
striita kiel zebro
stulta kiel azeno
ŝanĝema kiel meleagro
timema kiel hieno
tremanta kiel kokido
tromanĝema kiel urso
trotimema kiel muso
trovoluptema kiel koko
venĝema kiel vundita serpento
vesperdormema kiel kokino
vigla kiel kaprido
vivĝoja kiel kato
vorema kiel azeno

Multaj komparoj inter homoj kaj bestoj estas universalaj; oni uzas kaj komprenas ilin en preskaŭ ĉiu mond-parto kaj lingvo. Sed aliaj estas troveblaj nur en kelkaj lingvoj. Jen ni ricevis liston el la persa. Ĉu ni en aliaj kontinentoj kaj mondpartoj havas samajn esprimojn. Diskutu tion en via grupo: metu la komparojn en tri grupojn:

- Esprimoj, kiuj troviĝas en la propra lingvo;
- Esprimoj, kiuj ne troviĝas en via propra lingvo, sed ŝajnas esti trafaj kaj lertaj kaj facile kompreneblaj;
- Esprimoj, kiuj ŝajnas strangaj aŭ neĝustaj, kiun vi mem ne uzus kaj eĉ eble ne komprenus

En la lastaj du kazoj, ĉu vi trovas komparan esprimon en via lingvo por la kvalito aŭ la besto? Eble vi povos sendi al ni rezulton de viaj diskutoj.

VORTKLARIGOJ

hirudo: primitiva besto, kiu ligas sin al grandaj bestoj aŭ homoj kaj suĉas la sangon; en la antaŭa jarcento uzita por kuracaj celoj (sen granda utilo!)
perdriko: mezgranda birdo, kiun oni ŝatas ĉasi en kelkaj landoj
upupo: mezgranda birdo kun elstara plumo sur la kapo-pinto.
akrido: insekto simila al lokusto.

avida: ŝparema
kaduka: disfalanta pro aĝo aŭ miskondutado
koketa: provante tiri la atenton kaj admiron de aliaj
korpulenta: grand-korpa, dika
magra: maldika
malica: malbonintenca
muta: senparola
orgojla: fanfaronema, sin-dismontrema
rankora: malbonhumura
volupta: deziranta korpajn plezurojn
vorema: manĝegema